

RAMON LULL

(1235-1315)

Ramono Luljo (Katalune: Ramon Lull) estis eminenta kataluna poligrafiisto kaj la plej potenca talentulo en lia epoko. Naskiĝinta en la ĉefurbo de la insulo Majorko la jaron 1235, li vivis ĝis la maljuna aĝo de 80 jaroj kaj mortis tragike en Bugio (Afriko) en la jaro 1315, turmentita de la maŭroj kiuj lin persekutis kaj kaptis okaze de liaj predikoj de propagando por la kristana religio. Li estis filo de la nobla kavaliro de sama nomo kaj de Ano Herill. En la unuaj tempoj de lia junaĝo la kataluna reĝo Jakobo I^a lin prenis kiel paĝion kaj post kelka tempo la reĝprinco de Aragono lin prenis kiel grandan *seneskalon* kaj ĉefon de lia reĝa domo. Liaj grandaj avidoj por la studado kaj kristana savamo lin igis forlasi, en la aĝo 40-jara, la reĝan kortegon, kie ĉio estis voluptamo, por veturi al Parizo entrepreni studadojn. Post kelka tempo li reiris al sia insulo kaj konsente kun siaj edzino kaj filoj, li iris sin instalati sola en la ermitejo de Randa, ĉar li tie povos pli intense sin dediĉi al la studado kaj al la pentofarado. En tiu izolita loko, sen ia persona kunesto, li konceptis sian faman verkon *Ĝenerala Arto*, por lernigi ĉiuspecajn sciencojn, fonton kaj devenon de la lulja filozofio. Eminentia fervorulo de la kristana doktrino, li ne povis elmeti al la lumo sian verkon sen antaŭa aprobo de la Papo, por kies celo li forveturis al Romo, kie li vizitis la tiaman Papon, Klemento V^a, kiu lin sendis al Parizo por ke la scienculoj de la Sorbono ekzameni lian verkon. En Parizo li konatiĝis kun Scoto kaj vidis varme akceptita sian faman verkon *Ĝenerala Arto*. De post tiu tempo la agemeco de Ramono Luljo fariĝis eksterordinara, kaj li ek- kaj revojaĝis tra Eŭropo, dum kiuj vojaĝoj li verkadis, instruadis kaj diskonigadis siajn verkojn kun avido. Krom tio, frapita de novaj entreprenoj li vizitis la Sanktan Landon, Egiptujon, Etiopion kaj Marokon, ĉiam kun gravegaj celoj kaj ĉefe okaze de la granda krucmilitiro kontraŭ la mahometanoj. Poligloto fama, li same verkis katalunlingve kiel latine, kaj ankaŭ en maŭra lingvo, ĉiam kun nekredebla fekundeco. En liaj lastaj tempoj de vivado li transiris de Majorko al Tunisujo kaj al Bugio (Afriko), kie oni kaptis lin, ŝarĝis lin per katenoj kaj fermis lin en karceron, el kiu situacio li nur eliris por morti ŝtonbatita. Lian korpon ankoraŭ spiretantan kunprenis Ĝenovaj navigantoj, kiuj ĝin kondukis al Majorko. Viro de senkompara agemeco, li konstante peniĝis por disvastigi la scion kaj la praktikiĝon de la bonfarado per siaj varmaj predikoj saturataj de

sankta kristaneco, sed lia plej fervora deziro estis konverti la mondon al la kristanismo pere de la prediko kaj, en lasta okazo, de la armita forto. Li fondis diversajn kolegiojn de orientaj lingvoj por krei kompetentajn misiulojn, unue en Majorko (jaro 1275), en Romo poste kaj fine en Francujo kie li sukcesis ke la tiama Papo, Nikolao IV^a, establu aliajn. Oni ne havas ĝustan ideon pri lia verka produktajo, tial ke ĝi ne estas bone katalogita nek sufiĉe konita. Oni tamen povas aserti ke lia verko transiras cent dudek titolojn. Li verkis verse kaj proze literaturon, sciencan, religion, filozofion, vojaĝojn, ktp. Li elkonis hemion, juron, matematikojn, estetikon kaj teologion, kaj pritraktis ĉi-tiujn aspektojn de la homa scio kun kriterio kaj formoj tute propraj. Liaj doktrinoj estis multe diskutataj, sed ili havis propran universitaton en Majorko; krom tio ili estis oficiale instruataj en Romo kaj Parizo, kaj permesataj en la hispanaj universitatoj. Inter la senombra kvanto da traktatoj kaj aliaj verkoj de tiu eminenta scienculo, majstre evidentigas: *Generala Arto*, bazo de lia sistemo; *Libro de Elmedito*, ĉefverko de la aŭtoro; *Feliĉa je la mondaj mirindaĵoj*; *Libro pri la ĝentilulo kaj la tri saĝuloj* (verkita inter la jaroj 1272 kaj 1275); *En unua kaj dua intencoj* (1283); *Blankerna* (inter 1283 kaj 1285); de kies tuto formas parton pecoj tiel mirindaj kiel *La amiko kaj la amato* kaj aliaj. En verso, estas speciale memorindaj: *Senkonsolo*; *Cent nomoj de dio*; *Proverboj*; *Eklezia konsiliĝo*; *Peko de Adamo*; ktp.

KIEL ONI OBSERVAS, EN TIU-ĈI MONDO, KIAJ AFEROJ ESTAS BELAJ KAJ KIAJ MALBELAJ

Ho Dio glora, ama! Al Vi, Sinjoro, estu farata riverenco kaj honoro por ĉiuj tempoj, ĉar vi ordigis kaj aranĝis en tia ordigo kaj en tia aranĝo la homon, ke li povu vidi per okuloj korpaj kaj spiritaj la belecojn kaj la malbelecojn de tiu-ĉi mondo. Bonvola Sinjoro, plena de favoremo! Tiel, kiel la korpaj okuloj vidas kio estas malbela kaj kio estas bela en la sentaj aferoj, same per spiritaj okuloj ni vidas en la aferoj intelektaj kio estas bela kaj kio estas malbela. Se al la korpaj okuloj, Sinjoro, estas plaĉe vidi la helecon de la tagiĝo aŭ de la matena stelo, aŭ la herbejojn, aŭ la florojn, aŭ la marbordojn aŭ la arbarojn, al la spiritaj okuloj estas plaĉe pripensi kaj vidi, en la virtoj de la homo, same kiel amon, tiel ankaŭ paciencon, lojalecon, humilecon, piecon kaj kompaton.

Ho, malavara Sinjoro, justa, saĝa, vera en ĉiuj aferoj! Se al la korpaj okuloj plaĉas vidi la belan virinon, bone vestitan kaj ornamitan, al la spiritaj okuloj estas tre malbele vidi ŝin, se okazas ke la virino estas malŝatinda, malmobla, kun malbonaj agoj, kun malpurajoj.

Ama Sinjoro! Tiel, kiel la spiritaj okuloj estas pli noblaj kaj bonaj ol la korpaj okuloj, same estas pli granda plezuro kaj pli bona vido vidi la aferojn belajn por la okuloj spiritaj, ol vidi tiujn aferojn, kiuj estas belaj por la okuloj korpaj. En simila maniero, Sinjoro, okazas pri la malbelajoj; ĉar multe pli abomene, haladze kaj malbele estas vidi la aferojn estantajn malbelaj laŭ vido spirita, ol vidi la aferojn estantajn malbelaj laŭ vido korpa. Do, ĉar tio estas tiel, multe mirigas min kiel povas esti ke la homoj pli amas la vidon de la okuloj korpaj, ol tiun de la okuloj spiritaj, kaj ke ili pli sentas la belecon aŭ malbelecon vidatan per korpaj okuloj, ol tiun vidatan per okuloj spiritaj.

(*Libre de Contemplació*. Distinct. XXIII, Cap. CIV.)

MORALAJ METAFOROJ EL LA "LIBRO DE LA AMIKO" KAJ LA AMATO"

La vojoj tra kiuj la Amiko serĉadas sian Amaton estas longaj kaj danĝeraj, plenaj de konsideroj, de sopiroj kaj de ploroj, kaj lumigataj de amoj.

Diris la Amiko al la Amato: Vi, kiu plenigas la sunon de heleco, plenigu mian koron de amo. — Respondis la Amato: Sen ekzisto de amo ne estus viaj okuloj larmoplenaj, nek vi — veninta en tiun-ĉi lokon vidi vian amanton.

Diru, Amiko, diris la Amato, ĉu vi havos paciencon se mi duobligas viajn ĉagrenojn? — Respondis la Amiko: Jes, Amato, se nur vi duobligas miajn amojn.

Diris la Amato al la Amiko: Ĉu vi scias jam kio estas amo? — Respondo: Se mi ne scius kio estas amo, mi scius kio estas laboro, malĝojo kaj doloro.

Diru, birdo kantanta: ĉu vi metis vin en servon de mia Amato, por ke li gardu vin de neamo kaj multobligu en vi amon? — Res-

¹ *La Amiko*: la homo.

² *La Amato*: Dio.

pondis la birdo: Kaj kiu kantigas min, se tiu ne estas nur la sinjoro de amo, por kiu neamo estas nehonoro?

Demando estis inter la okuloj kaj la memoro de la Amiko; ĉar la okuloj diradis ke pli bone estas vidi la Amaton ol rememori lin; kaj la memoro diris ke per la memorado supreniras la akvo al la okuloj, kaj la koro ekflamiĝas de amo.

Venis la Amiko trinki en la fonto kie neamanto enamiĝas per trinko el la fonto, kaj duobligis liaj ĉagrenoj. Kaj venis la Amato trinki en la fonto, por ankoraŭ duobligi al sia Amiko liajn amojn, per kiuj li duobligis liajn ĉagrenojn.

Kantadis la birdo en la ĝardeno de la Amato, kaj venis la Amiko, kiu diris al la birdo: Se ni ne interkompreniĝas per lingvo, ni kompreniĝu per amo; ĉar en via kanto prezentiĝas al miaj okuloj mia Amato.

Diru, birdo kantanta pro amo, al mia Amato: kial li turmentas min per la amo naskiĝinta ĉe mi esti lia servanto? — Respondis la birdo: Se vi ne havus laborojn pro amo, per kio vi amus vian Amaton?

Renkontiĝis la Amiko kaj la Amato kaj diris la Amato al la Amiko: Ne necesas ke vi parolu; sed faru signojn per viaj okuloj, kiuj estas paroloj al mia koro, kiam mi donas al vi kion vi petas.

Pensema iradis la Amiko tra la vojoj de sia Amato, kaj li ek-tuŝis kaj falis kontraŭ dornojn, kiuj al li ŝajnis esti floroj kaj ama kuŝloko.

Deziris la Amiko solecon, kaj li iris esti tute sola por havi kunecon de sia Amato, kun kiu li estas sola inter la homoj.

Diru: se vin neamus via Amato, kion vi farus? — La Amiko respondis kaj diris ke li amus por ke li ne mortu, tial ke neamo estas morto kaj amo estas vivo.

Oni demandis al la Amiko ĉu estas eble ke la Amato ne plu veku lian amon. Li respondis ke ne, dum la memoro memoros kaj la penso komprenos la noblecojn de sia Amato.

Mortadis la Amiko pro plezuro kaj vivadis pro melankolio. Kaj la plezuroj kaj la turmentoj akordiĝis kaj kuniĝis en unu saman

aferon ĉe la volo de la Amiko; kaj tial la Amiko en sama tempo mortadis kaj vivadis.

Amo estas ŝtorma maro de ondegoj kaj de ventegoj, kiu ne havas havenon nek bordon. Pereas la Amiko en la maron, kaj en lia pereco mortas liaj turmentoj kaj naskiĝas liaj cel-plenumiĝoj.

Oni demandis al la Amiko, kio estas la mondo. Li respondis: Libro ĝi estas, por tiuj kiuj scias legi, en kiu estas konata mia Amato. — Oni demandis al li, ĉu lia Amato estas en la mondo. Li respondis: Jes, kiel la verkisto en la libro. — Kaj en kiu estas tiu libro? — Li respondis: En mia Amato, pro tio ke mia Amato enhavas ĉiujn aferojn, kaj tial la mondo estas en mia Amato kaj ne estas mia Amato en la mondo.

JAUME I, EL CONQUERIDOR

(1274)

LA KRONIKO DE LA "KONKERANTO"

Nedubebla por la artisto, diskutebla por la instruito, la aŭtentikeco de tiu reĝa Kroniko de antaŭ unu jarcento estas fekunda temo.

Verkita—mi kredas tion—kun la helpo de fidela kaj lerta sekretario, de tiu fervora viro, kataluno ĝis la radikoj, kuraĝa kavaliro kaj potenca reĝo, jam en la vesperiĝo de lia vivo kaj de lia gloro, tiu Kroniko ne estas libro de memoroj, sed libro de memorindaj faktoj. La plej gravaj el lia reĝado kaj la plej firme gravurigitaj en lia memoro estas tiuj, kiujn Jakobo I alportas al sia Kroniko, aŭtobiografio kaj defendo de la nova politiko kiun li inaŭguradis.

La Kroniko, al kiu ni povas aljuĝi la proksimuman daton de la jaro 1274, estas la unua granda monumento de la plej nacia el niaj literaturaj specoj: la Historiografio.

Kredante sin dotita de providenca misio, Jaume I ĝojadas rakonti la mirindaĵojn de siaj naskiĝo kaj infaneco, kaj transiras tuj al la gloraj manifestiĝoj de sia junaĝo. Neniu el tiuj manifestadoj formas, kiel la konkerado de Mallorca (1238)—"regno en maro" kiun li nostalgis dum la tuta vivo—tiel bone difinitan unuon, kie la animo de la reĝo kaj tiu de la popolo pulsas tiel akorde.

La spirito de praktika aventurismo—kiu estis la forto de la moderna Anglujo—estis ankaŭ tiu de la antikva Katalunujo, kaj ĝi evidentiĝas unufoje per tiu militiro al Mallorca, decidita de militistoj kaj de komercistoj.

Priskribante la agojn de la propra vivo, Jaume I ne povas esti objektiva kiel Desclot, al kiu, pli ol al Muntaner, li similas pro la sobreco de la stilo kaj pro tiu emo lasi ke estu la faktoj la parolantaj. Kvar generaciojn poste, volis imiti lin—kun la kunlaboro de Bernat Descoll—la reĝo Petro la *Ceremonia*; en unu afero, tamen, tiu-ĉi restas tre malproksime de la alia: en la odoro je sincereco kiun la Kroniko de la *Konkeranto* eligas.

Katalune verkis

LLUIS NICOLAU D'OLWER

El "La conquesta de Mallorca" (redukcio de Nicolau d'Olwer) eltirita de la "Crònica de Jaume I" eldono Marian Aguiló.

Kolekto "Minerva", Barcelona, 1920.

EL LA "KRONIKO"

(Fragmentoj de la paragrafoj 60-68 pri la konkerado de Mallorca)

Kaj ni en tiu loko renkontis kavaliron kaj diris al li: "Kiel estis tio-ĉi kaj kion faris la niaj?—Kaj li diris: "La grafo d'Empúries kaj la kavaliroj Templanoj iris vundi tiujn kiuj estis en la tendo, kaj En Guillem de Muncada kaj En Ramon iris ataki ĉe la maldekstra flanko."—Kaj ni diris: "Ĉu vi scias ion plu?"— "Jes, ke tri fojojn venkis la kristanoj la maŭrojn, kaj la maŭroj la kristanojn tri fojojn."—Kaj poste ni demandis: "Kie ili estas?"—Kaj li diris: "En tiu montaro."

Kaj mi renkontis En Guillem de Mediona, pri kiu oni diradis ke en tuta Katalunujo neniu rajdas kiel li, kiam li eliris el la batalo kaj elfluis el li sango ĉe la lipoj kaj sub la buŝo.—Kaj ni diris al li: "En¹ Guillem de Mediona, kial vi eliras el la batalo?"—Kaj li diris: "Ĉar mi estas vundita." Kaj ni timis ke li estas vundita de mortvundo ĉe la korpo.—Kaj mi diris: "Kaj per kio vi estas vundita?"—"Per ŝtono kiun oni ĵetis al mi sub la buŝon, mi estas vundita." Kaj ni prenis liajn bridojn kaj diris: "Reiru al la batalo, ĉar bona kavaliro pro bato kiel tiu incitigi devas, kaj ne eliri el la batalo." Kaj post momento, kiam ni lin rigardis, ni ne plu lin vidis.

Kaj kiam ni estis forrajdintaj unu mejlon, venis al ni la episkopo de Barcelona, kaj diris: "Sinjoro, pro amo al Dio ne tiom rapidu."—Kial ne, episkopo? ĉar tio estas plej bona."—Kaj li diris: "Mi volas paroli kun vi." Kaj li tiris min el la vojo, kaj diris: "Ha, sinjoro, pli vi estas perdinta ol vi pensas, ĉar En Guillem de Muncada kaj En Ramon estas mortintaj."—"Kiel mortintaj?", ni diris, kaj ni ekploris. Kaj poste ni diris al la episkopo: "Ni ne ploru, ĉar nun ne estas horo plori, sed ni levu ilin el la kampo ĉar ili mortis."

Kaj kiam en la tagiĝo jam estis starigata la tendaro, kuniĝis la episkopoj kaj la nobeloj kaj venis al nia tendo, kaj diris la episkopo de Barcelona, nomata En Berenguer de Palou:—"Sinjoro, necese estus ke tiujn korpojn, kiuj estas mortintaj, oni enterigu."—Kaj ni diris: "Jes, bone; kiam vi volas ke ni enterigu ilin?"—Kaj ili diris: "Nun aŭ vespere, aŭ kiam ni estos manĝintaj."—Kaj ni diris: "Pli bone estos dum la vespero, kiam neniu vidos tion nek ĝin povos vidi la arabo." Kaj respondis la nobeloj ke ni bone diras.

¹ En katalune egalvaloras la hispanan titolon "Don": Sinjoro.

Kaj kiam venis la sunsubiro ni petis tolojn larĝajn kaj longajn, kaj ni igis meti ilin ĉe la flanko de la vilaĝo por ke oni ne vidu la kandelojn ĉe la enterigo. Kaj kiam ni volis fari la enterigon, ĉiuj komencis plori kaj funebri kaj ĝemi. Kaj ni diris ke ili silentu kaj aŭskultu kion ni volas diri al ili kaj ni parolis tiel:

“Viroj, ĉi-tiuj ĝentilhomoj mortis en servo de Dio kaj nia; kaj se ni povus ilin reakiri, ke ilian morton ni povus ŝanĝi en vivon, kaj ke Dio donus al ni tian gracon, tiom ni donus por ili ke nia ago ŝajnus freneza al tiuj kiuj aŭdus kiom ni volas doni. Sed, ĉar Dio kondukis ĉi-tien nin kaj vin en servo al Li, ne decas ke iu funebru aŭ ploru, kaj kvankam la ĉagreno estas granda, ni ne montru ĝin ekstere. Kaj mi ordonas al vi, pro la sinjoreco kiun mi havas sur vin, ke neniŭ ploru nek funebru, ĉar ni estos via sinjoro, tiel ke ni anstataŭos la bonon kiun vi estus ricevintaj. Kaj se iu perdas ĉevalon aŭ ion alian, ni ĝin kompensas kaj plenumos viajn necesojn, kaj ne mankos al vi viaj sinjoroj nek vi rimarkos ilian perdodon: tiel ni provizos je viaj bezonoj; ĉar la funebro kiun vi montrus estus malkonsolo por la armeo, kaj por vi ne estus konsolo; pro tio mi ordonas ke neniŭ ploru. Ĉu vi scias kia estu nia ploro? ke ni kun vi kaj vi kun ni vendu kara ilian morton, kaj ni servu nian Sinjoron en tio por kio ni venis ĉi-tien, kaj ke lia nomo estu sanktigata por ĉiam”. Kaj post tiuj vortoj ili konsoliĝis je la funebro, kiun ili ne montris, kaj ili faris la enterigon.

BERNAT METGE

(1350-1412)

La plej granda prozisto de nia lingvo, kia estas Bernat Metge, naskiĝis en Barcelona ĉirkaŭ la jaro 1350, kaj mortis dum la interregno kiu entronigis la domon de Antequera.

La publika vivo de Metge forte kunligiĝas kun lia verkista vivo. Enirinta jam de sia frua juneco en la servon de la reĝaj aferoj, li daŭras en tiu ofico ĝis la morto de la reĝo Martí (1410), levigante de modesta situacio de skribisto de la trezorejo ĝis la altega posteno de sekretario de la reĝo kaj administranto de la sigelo. Rapida kaj brilanta vojiro, ŝuldata pli al liaj kvalitoj intelektaj ol al liaj kvalitoj moralaj. Tri fojojn li estis forigata de la Kortego; tri fojojn li revenis en ĝin, akompanata de literatura verko, per kies kunmetado li estis malpeziginta la angorojn de la proceso kaj la enuon de la karcero.

Literature, li apartenas al du aĝoj. La *Libre de Fortuna e Prudència* (1381), “novaĵoj” rimitaj en provencalema lingvaĵo, inspiritaj en Boeci kaj la *Roman de la Rose*, estas verko pure mezepoka. La *Història de Griselda* (1386), traduko de la latina teksto de Petrarca, estas la unua eniro de la Renesanco en nian literaturon: la prozo plej zorga kiu ĝis tiam estis skribita katalune, vestanta fekundan provon de novelo sentimentala, kiu malproksimiĝas de la literatura gusto mezepoka, restante tamen fidelega al ĝia katolika spirito. *El Somni* (1398) signifas la triumfon de la humanismo, eble pli antaŭsentita ol asimilita. En tiu-ĉi dialogo estas parto historia kaj sociala, kiu estas atesto havanta altegan valoron kolektivian, sed estas alia filozofia kie ni divenas la personan pozicion de Metge, kiu ne estas ja la ŝajnigata de li en la diskuto, nek tiu kiun subtenas lia kontraŭstaranto, la reĝo Johano: ĝi estas tiu de skeptikulo dubanta, pli ol pri la eksteraj aferoj, pri la fortoj de sia propra racio por koni ilin.

Katalune verkis

LLUIS NICOLAU D'OLWER.

Lastaj eldonoj de “El Somni” (La Sonĝo): 1889, Paris-Bordeaux, de J. M. Guàrdia; 1891, Barcelona, de A. Bulbena; 1907, Barcelona, de A. Miquel i Planas, en “Històries d'altre temps”; 1910, Barcelona, de la sama, en “Nova biblioteca catalana”; 1919, Barcelona, redukcio de Lluís Nicolau d'Olwer, en la kolekto “Minerva”; 1924, Barcelona, de Josep M. de Casacuberta, en “Els nostres clàssics”.

LA SONĜO

LIBRO UNUA (fragmento)

Malmulta tempo pasis de kiam, estante en malliberejo—ne pro malhonoroj kiujn miaj persekutantoj kaj envianoj sciis pri mi, kiel poste por ilia honto klare elmontriĝis, sed pro nura malamo ilia, aŭ eble pro ia sekreta volo de Dio—, iun vendredon, ĉirkaŭ noktomezo, studante en la ĉambro kie mi kutime estis, kiu ĉambro estas atestanto de miaj meditoj, mi eksentis tre grandan deziron dormi; kaj stariginte mi iom promenis tra la dirita ĉambro, sed kun subita granda dormemo mi kuŝiĝis sur la lito, kaj tuj, ne senvestiginte min, mi dormiĝis, ne ja en la kutima formo, sed tiel kiel malsanuloj aŭ malsatantoj kutimas dormi.

Kaj tiel, al mi aperis, laŭ mia ŝajno, viro de meza staturato, kun solena vizaĝo, vestita per hele ruĝa veluro, dissemita de duoblaj kronoj oraj, kun ruĝa ĉapelo sur la kapo. Kaj lin akompanis du viroj de granda staturato; unu el kiuj estis juna, tre bela, kaj tenis liron en la manoj; la alia estis tre maljuna, kun longa barbo kaj sen okuloj, kaj havis grandan bastonon en la mano.

Kaj ĉirkaŭ tiuj supre diritaj estis multaj falkoj, kastoroj kaj diverspecaj hundoj, kiuj blekadis kaj bojadis tre malbele.

Kaj kiam mi estis bone observinta speciale la diritan viron de meza staturato, al mi ŝajnis vidi la reĝon Johanon de Aragono, de glora memoro, kiu antaŭ nemulte estis forpasinta de tiu-ĉi vivo, al kiu longtempe mi estis servinta. Kaj pridubante, kiu li estas, mi terure ektimiĝis. Tiam li al mi diris:

—Forigu ĉian timon de vi, ĉar mi estas tiu kiun vi pensas.

Kiam mi aŭdis lin paroli, tuj mi konis lin; poste mi diris tremante:

—Ho Sinjoro, kiel vi estas ĉi-tie? Ĉu vi ne mortis antaŭ kelkaj tagoj?

—Mi ne mortis, li diris, sed lasis la karnon al ĝia patrino kaj redonis la spiriton al Dio, kiu ĝin estis doninta al mi.

—Ĉu la spirito?, mi diris. Mi ne povas kredi ke la spirito, se ĝi estas io, povas havi alian vojon krom tiu kiun la karno havas.

—Nu, kion vi pensas, li diris, pri tio kio mi estas? Ĉu vi ne scias ke antaŭ kelkaj tagoj mi forpasis de la korpa vivo en kiu mi estis?

—Mi aŭdis tion, mi respondis, sed ĝin nun mi ne kredas, ĉar se vi estus mortinta vi ne estus tie-ĉi. Kaj mi pensas ke vi estas vivanta, sed la popolamaso diras tion pro la volo ke estus tiel, ĉar ĝi ĉiam ĝojiga pri novaĵoj, kaj speciale pri nova regeco; aŭ pro ia kombinaĵo kiun oni volas fari, oni kreis la famon ke vi estas mortinta.

—La famo, li diris, estas vera, ĉar mi pagis la ŝuldon al la naturo, kaj mia spirito estas tiu kiu parolas kun vi.

—Vi, Sinjoro, povos diri al mi kio al vi plaĉos. Sed, parolante kun via reverenco, mi ne kredos ke vi estas mortinta; ĉar mortaj homoj ne parolas.

—Vere estas, li diris, ke la mortintoj ne parolas; sed la spirito ne mortas, kaj sekve ne estas al ĝi necble paroli.

—Ne ŝajnas al mi, mi diris, ke la spirito estas io post la morto, ĉar multajn fojojn mi vidis morti homojn kaj brutojn kaj birdojn, kaj mi ne vidis ke spirito nek alia aĵo eliĝas el ilia korpo, per kiu mi povu koni ke karno kaj spirito estas du aferoj malsamaj kaj disigitaj. Sed ĉiam mi kredis ke tio, kion oni diras spirito aŭ animo, ne estas io alia ol la sango aŭ la natura varmo estanta en la korpo, kiu pro la neakordiĝo de siaj kvar fluiĝaj substancoj mortiĝas, tiel kiel faras la fajro, pro la vento kiu ĝin forĵetas de ĝia loko, aŭ kiam estas aliigita la medio en kiu ĝi troviĝas, kaj ĝi estingiĝas; kaj de tiam plue oni ne vidas ĝin.

—Multe vi estas trompita, li diris; ŝajnas ke vi ne faras diferencon inter spirito kaj spirito.

—Mi ne faras ian, mi diris; ĉiujn aĵojn animitajn mi vidas morti en unu maniero.

—Ne estas vere ke ili en unu maniero mortas, li diris; ĉar tri specojn de vivantaj spiritoj kreis Nia Sinjoro Dio. Iuj, kiuj en la kreado de la mondo havis originon de Li, kaj ne estas kovritaj de karno, kaj tiuj estas anĝeloj; aliaj, kiuj havas novan devenon de la Kreinto kaj estas kovritaj de karno, sed ne mortas kun ĝi, kaj tiuj estas homoj; aliaj kiuj estas kovritaj de karno, kaj naskiĝas kaj mortas kun ĝi, kaj tiuj estas animaloj brutoj. La homo estas kreita en la mezo, por ke li estu pli malalta ol la anĝeloj kaj pli alta ol la bestoj, kaj por ke li havu ion komunan kun tio supera kaj kun tio malsupera, nome, senmortecon kun la anĝeloj kaj mortecon de la karno kun la bestoj, ĝis kiam la Reviviĝo senefikiĝos la mortemecon.

—Mi jam diris al vi, Sinjoro, ke ĉiujn animitajn aĵojn mi vidis morti en unu maniero, kaj neniam mi vidis la malon. (Kelkaj linioj forigitaj.) Kion mi vidas, tion mi kredas, kaj la ceteron mi ne prizorgas.

—Diru, li respondis, antaŭ ol vi venis en la mondon, kio vi estis?

—Tio, kio mi estos post la morto, mi diris.

—Kaj kio vi estos?

—Nenio.

—Do nenio vi estis antaŭ ol vi estis generata?

—Tion mi kredas, mi diris.

—Kaj kial vi kredas tion?

—Tial ke ĉiun tagon mi vidas ke la virino per la kuniĝo kun la viro iĝas graveda, kaj antaŭe ŝi ne estis tia, kaj poste akuŝas iun infanon, kiu de ne esto venas al esto.

—Jes; sed, li diris, kion vi vidis en aliaj, tion vi ne vidis en

(1) malo = mal-o ; lo contrario

vi mem. Sed diru al mi, se vi memoras, kio vi estis antaŭ ol vi estis generata?

—Al mi, mi diris, nenio venas en la memoron, nek mi estas certa kio mi estis, ĉar mi ne vidis ĝin, sed mi firme kredas ke mi estis nenio: ĉar mi estas kiel la aliaj, kaj konvenas ke mi sekvu iliajn piedsignojn.

—Nu, li diris, ĉu vi kredas kion vi ne vidis?

—Vere estas, Sinjoro, ke kelkajn aferojn mi kredas, kiujn mi ne vidis; mi ne povas nei tion.

(Daŭras la dialogo kun dubaj demandoj, respondataj de la reĝo kun argumentoj pri la ekzisto kaj senmorteco de la animo, eliritaj el latinaj aŭtoroj.)

LIBRO TRIA (fragmento)

—Nun vi ne koleriĝu, li diris. Vi ĵus diris ke vi amas kaj estas kore amata de virino, kiu egalas aŭ superas en saĝo, beleco kaj gracio ĉiun vivantan virinon: aŭ tiu-ĉi estas via edzino, aŭ ne. Se tiu estas via edzino, malsaĝe vi estas parolinta, ĉar vi laŭdis vin mem, pro tio ke ŝi estas karno de via karno kaj osto de viaj ostoj, kaj laŭdi sin mem, se Aristotil diris vere, estas tre vante. Se tiu ne estas via edzino, vi ne povas diri ke vi estas kontenta pri tio kion vi havas; ĉar esti kontenta ne estas io alia ol ripozi en sia deziro kaj eviti deziri superfluajn aĵojn. Kaj ĉar al viro, pli se li estas katoliko, kiel estas vi, devas sufiĉi unu virino, tio estas, lia edzino, nepre sekvas ke el du aferoj okazas unu, nome: aŭ ke vi estas malsaĝa aŭ vanta, pro tio ke vi laŭdis vin mem, aŭ ke vi ne estas kontenta pri tio kion vi havas, kaj sekve vi ne havas la bonon troveblan en monda feliĉo. Se malsaĝa vi estas, mian intencon mi atingis; se vi ne estas kontenta, vi deziras feliĉon, kies grandecon laŭ via kompreno konsistigas ami virinojn, kaj okazon por tio donas nur la nescio. Se pri tiu-ĉi vi volas vin kuraci, tio estas en via mano.

(Kelkaj paragrafoj forigitaj.)

—Mi ne povas insisti, mi diris, ke min kontentigas kion mi havas, ĉar verdire la virino kiun mi tiel amas ne estas mia edzino. Vi sciu ke multe pli mi amas tiun, sen ia komparo. Sed ja mian edzinon mi amas tiom, kiom la edzoj kutimas.

—Ĉar vi veron konfesis, li diris, la ludon mi streĉos al vi en mallongaj vortoj. Ne povas havi feliĉon iu en la mondo, kiu metas sian amon en virinon. Kaj kreu al mi, kiu ne malkonas iliajn kutimojn.

—Eĉ ne en sian edzinon? mi diris.

—Ne en sian edzinon, li respondis, nek en alian.

—Nun mi konfesas, mi diris, ke al mi estas necesa via zorgo. ple se racie vi povas al mi fundamenti kaj pruvi ke tiel estas kiel vi diris, ĉar la malon mi imagis kaj kredis ĉiam.

Tiam li, kun mieno de tiu kiu kun granda amo, laŭ mia juĝo, volas paroli, mallevis la kapon iomete, kaj, levante la ŝultrojn, etendis la manon al mi dirante:

—La reala kaj ĉefa kaŭzo de via malbono estas tio, ke vi ne scias la ecojn kaj manierojn de virino; ĉar se vi ne malkonus tion, vi ne opinius kiel nun. Kaj por ke vi certiĝu pri ĝi, atentu bone al tio kion mi diros.

Virino estas animalo neperfekta, de pasioj diversaj, malplaĉaj kaj abomenindaj plenregata, ne amanta ion alian krom siaj propraj korpo kaj deziroj, kaj se la viroj ŝin rigardus tiel kiel ili devus, post kiam ili estus farintaj kio al la homa naturo apartenas, ili forkurus de ŝi kiel de la morto.

(Sekvas longaj riproĉoj kontraŭ la virinoj.)

LIBRO KVARA (fragmento)

—Aŭdu do, mi diris, pacience kion mi diros al vi, kaj en nenio de mi dirata pri la viroj vi vin sentu aludita, ĉar mi ne parolos pri ĉiuj, sed nur pri la malbonaj kaj malvirtaj, kaj en simila maniero vi agis, se mi ne eraras, en la malbona diro pri virinoj. Al mi sufiĉas nur ke unu vera konkludo rezultu el mia diro: ke se la virinoj eraras, tion faras ankaŭ la viroj: kaj ke se ili ne meritas esti amataj, ankaŭ ne la viroj; kaj ke se ili devas esti malŝatataj pro nekonstanteco kaj aliaj malvirtoj, simile tiel devas esti la viroj: kaj sekve, ili ricevu malplian admonon, se ili eraras, ol tiuj-ĉi lastaj, kaj ne tiel grandan abomenon kiel supre vi montris al ili. Konsentu pri tio, kaj mi silentos, pro manko de tempo; ĉar pri aliaj aferoj mi volus interparoli kun vi.

—Pasu antaŭen, li diris; kiel, konsenti? male mi tion neas eksprese.

—Nun do, mi diris, kun via bonvolo mi procedos, kaj por mallongigi, mi tuŝos supraĵe kelkajn el la ĉefaj malvirtoj kiujn vi diris esti en la virinoj, pruvante al vi, laŭ mia povo, sen insulto por iu, esti pli grandaj la malvirtoj de la viroj.

Vi unue diris ke ili ne amas ion alian ol sin mem. Al vi mi certigas ke tia malsano komuna estas, kaj ke de ĝi pli estas regataj la viroj ol la virinoj; kaj se vi bone traserĉas tra la antikvaj historioj, vi tion vidos klare, ĉar po unu viro lasinta al si mortigi pro virinoj, vi renkontos kvar virinojn kiuj simile faris por viroj. Kaj, kiun vi konas, ja, kiu amas iun virinon, se ne pro amo al si mem kaj pro tio ke li povu plenumi sian propran deziron? Ilin amas la viroj dum ili estas belaj kaj junaj; poste, tiuj diros: "Tiu pelto devus reveni al la peltisto, ĉar ĝi tro pendas. En marto devus esti tranĉita tiu vinberbranco, ĉar eliĝis tro da vegetaĵoj. Tiu sako devus esti ligata, ĉar ĝi povus fali." Kaj multajn aliajn ŝercojn kaj rikanojn direblajn pli trafe al ili mem.

Vi diras ke ili ne estas puraj. Mi ne scias koni ke la viroj estas pli puraj; se nur vi ne parolis pri la naturaj akcidentoj, kaj bone vi scias ke pri la aferoj kiuj nature venas, neniu devas esti laŭdata aŭ mallaŭdata, ĉar ili ne estas en nia volo. Laŭ mia juĝo, pli pretaj estas la virinoj ol la viroj fari puraj la malpurajn aĵojn.

Pri sinpentrado vi riproĉis ilin, kaj pri eltrovo de novaj kaj pompaj modoj, kaj pri la granda zorgo kaj diligenteco kiujn ili havas en sia kombado. Mi akceptas ke estas tiel kiel vi diras: pri tiu-ĉi peko per benita akvo ili devas esti absolvataj, ĉar la kulpon pli havas la viroj, kiuj, rilate al sia kondiĉo, agas pli malbone ol la virinoj.

(Forigitaj kelkaj satiraj paragrafoj pri la mezepoka vira vestmaniero.)

Pri la volo regi siajn edzojn vi akuzis ilin. Vi eraras, ili ne deziras tion, sed ili prave volas influu siajn kunulojn, komune inklinajn al malbono, ĉar ili scias ke ili estas kamaradoj por la edzoj kaj egalaj al tiuj en la mastrumado de la domo.

Pri la kutimo sin bani ne parolu; ili bone agas, ĉar per ĝi ili estas pli puraj, pli gajaj, pli sanaj, kaj pli pretaj gravediĝi.

Malĉasto vi diras ke multe regas ilin. Ne ĉesu al mi diskuti kun vi pri tio, ĉar ĝin vi scias pli bone ol mi, pro tio ke ĉiun naturon (1) vi spertis; sed ja mi estas certa ke granda estas la malĉasto de la viroj, kaj mi plene memoras ke, en ĉio de mi legita, pli grandan mencion oni faras pri la malĉastaj agoj plenumitaj de la viroj ol pri tiuj de la virinoj, kaj sekvis pli grandaj malbonoj en la mondo el la unuaj, ol el la lastaj, kaj pli multaj estis la viroj trompintaj virinojn, ol trompintaj de ili.

(Kelkaj paragrafoj forigitaj.)

Avarecon vi aljuĝis al ili, malmultan firmecon, kaj vantecon. Ho, forte kulpa vi estas, dirinte tiajn vortojn. Kaj ĉu vi ne scias ke la virinoj necese devas esti iom ŝparemaj, pro tio ke ili ne havas rimedon ion gajni kaj ili volas eviti bezonojn? Se ili akceptas foje maljunajn edzojn, tio estas ĉar iliaj parencoj kaj amikoj volas ĝin, kaj ili pli bone edzinigitaj estas foje kun maljunaj edzoj ol kun junaj, kiuj malŝatas kaj forgesas ilin pro aliaj ne meritantaj esti iliaj servantinoj, kaj la maljunaj igas ami kaj honoru ilin same kiel ili faras pri si mem; kaj tiam la virinoj estas firmaj en la amo, ĉar ili vidas ke al ili oni faras same; kaj ili bone agas ŝatante la honorojn, ĉar ili ilin meritas; ĉar por bona virino ne sufiĉas ia prezo.

Se vi bone estus konsiderinta kiom tiaj malvirtoj regadas ĉe la viroj, ja vi ne estus parolinta tiel longe pri virinoj. Kiu povus sufiĉe paroli pri la avareco de tiuj, pri ties nekonstanteco kaj van-

(1) Aludo al tio ke la alparolato, Tirèsias, estis, laŭ la mito, unue viro kaj poste virino.

teco? Malmultaj aferoj estas, kiujn ili ne farus hodiaŭ pro mono: trouzi, hipokriti, fari malbonajn kontraktojn, spioni, mortigi, trompi, senhonorigi, atesti false, rabi, akuzi, mensogi, subkaŝi, ŝirmi malbonulojn kaj malbonaĵojn, devojigi per sia ruzo virinojn kaj knabinojn kaj ilin transdoni al aliuloj; jen kelkaj ekzemploj. Oni ne povas ion teni ĉe ili: jen ili havas unu intencon, jen alian; ĉe la enlitiĝo ili promesos iun aferon, kaj ĉe la ellitiĝo nenio restos: sen ia honto ili neos kion ili estos dirintaj kaj ĵurintaj. Ĉiuj kredas sin sufiĉaj por regi ne nur regnon, sed la tutan mondon. Kaj eĉ havante malmulton, se nur ili povas travivi la tempon sen granda laboro, ili ne volas ion fari, nek montri al la siaj sciencon aŭ arton per kiu ili povu vivi, male ili fieras ĉar tiuj iradas bone vestitaj, broditaj kaj rajdigitaj, kvazaŭ filoj de grandaj majstroj, kaj sin amuzas kaj foruzas la bonan tempon dum ĝi daŭras; poste ili devos ŝteli aŭ almozpeti tra la mondo, por ilia granda konfuzo kaj honto.

Vi pli diris ankoraŭ, ke la virinoj estas babilemaj kaj kritikemaj, kaj vi ŝercis pri la scio die enblovita ĉe ili. Vere, laŭ mia juĝo, sen ia pravo vi akuzas ilin. La interparolado de la virinoj komune temas nur pri aferoj malgrandetaj kaj pri dommastrumado; ja estas vere ke, ĉar ili estas nature subtilaj, ili komprenas kaj scias multajn aferojn unue kaj tre rapide, poste ili foje diras ilin familiare unuj al aliaj, sed el tio sekvas nenia malbono por iu. Sed ne okazas tiel ĉe la viroj, kies interparolado kaj kritikado estas abomena al Dio kaj malplaĉa kaj netolerebla al ĉiu persono kaj forte malbonefika por multaj. La plej multaj el ili estas bestoj de herbejo, kaj ĉiu kredas esti alia Salomono en scio, kaj alia Tulio en elokvento. Se oni parolas pri ia subtila temo antaŭ ili, ili diros esti multfoje diskutintaj ĝin kun homoj de granda scienco, kaj ke ili havas bonajn librojn pri tiu temo traktantajn. Se oni parolas kun ili pri armilaj faroj, ili diros ke Anibalo kaj Aleksandro estis sufiĉe bonaj kavaliroj, sed ke egale bonajn retrovus kiu bone serĉus, kaj ili volos aludi sin mem.

(Kelkaj paragrafoj forigitaj.)

Dancojn kaj kantojn vi diras ke la virinoj aŭskultas kun granda plezuro. Mi ne miras pri tio, ĉar natura afero estas trovi plaĉon en muziko, kaj speciale kiam ĝi estas miksitaj kun retoriko kaj poezio, kiuj ofte ĉeestas en la dancoj kaj kanzonoj diktataj de bonaj trobadoroj. Malmulte ŝatas la viroj aŭdi similajn aĵojn, kiujn ili devus scii fari por eviti la senokupecon kaj por povi bele diri la esprimon de sia penso, sed ili plezuras aŭdante mokantojn kaj rikanantojn, heroldojn kalumiantojn, malbonparolantojn, kriantojn, bruantojn, akuzantojn kaj perantojn de fanfaronaj kaj malbonaĵoj.

Grandaĵn ceremoniojn vi diris ke la virinoj atentis ĉe la ellitiĝo, kaj ke ili ne elirus el la ĉambro ĝis kiam ili estas bone aranĝitaj. Ho, vi ĝojas en la kritikado! Mi kredas ke vi volus ke ili

eliru el ĝi nudaj kaj ne kombitaj. Ili faras kion ili devas, kaj se ili alimaniere agus, ili pekus kontraŭ honto, kiu estas virto forte laŭdinda, kaj speciale ĉe virinoj. Ĉu vi scias pri kiuj oni povas diri tion? Certe pri la viroj, kiuj en la dudekono de unu horo devus esti vestitaj kaj aranĝitaj por eliri el dome, kaj, male, por butonumi la korsaĵon, tiri la pantalonon ĉe ok aŭ dek lokoj, rektigi la gamaŝojn, skui la brustŝirmaĵojn kaj ilin surmeti, kombi siajn harojn kiuj la pasintan nokton estis en premilo, lavi la vizaĝon per bonodoraj akvoj, esplori ĉu ili estas same aranĝitaj kiel la antaŭan tagon, surmeti ĉe la kolo ĉenojn, tintiletojn kaj tintilegojn, kaj ŝtrumpligilojn ĉe la kruroj, ili estos okupataj en la daŭro de tri horoj. Poste, ili vante montros sian korpon, malpuran interne pro malvirtoj kaj belan ekstere per sclenaj vestaĵoj. Konsideru, do, ĉu kompare al la mankoj de la viroj estas ja pardoneblaj la virinoj pri la malvirtoj kiujn vi aljuĝis al ili.

Tiam li, levante sian vizaĝon al mi, pensante iomete, diris.

—Mi ne povus sufiĉe klarigi al vi la ĝojon kiun mi havis el via lerteco. Fluabunde kaj kolorplene, laŭ mia juĝo, vi respondis al ĉio kion mi diris al vi pri virinoj. La vero tamen ne estas ŝanĝita, ĉar ĝi unu sola estas; kaj se vi volus konfesi kion diktas al vi via konscienco, vi konsentus esti vera ĉion kion supre mi diris al vi.

—Mi neniam farus tion, mi diris. Kun tiu-ĉi opinio mi volas morti.

—Mi konsilas al vi, li diris, ke vi ne faru tion, ĉar ĝi havas pli grandan ŝajnon ol ekziston de vereco. Forlasu de nun la amon al virinoj. Forkuru de ĉiu loko kaj okazo paroli kaj trakti kun ili, kaj evitu ilin kiel la fulmon. Superstara frenezo estas celi la ajon, kiu, atingita, donas la morton. Pro virino mortis Nabot, Samsó estis malliberigata kaj katenata, Josep enkarcerigata, Isboset mortigata, Salomó malfidela, David estis mortiganta, Sisara perfidata kaj mortigata per granda najlo, Hipólito, Agamemnon kaj kvardek naŭ filoj de Dánaus perdis la vivon. Sed kial mi perdas tempon en tio? La plej multaj el la malhelpoj kaj malbonoj estantaj en la mondo estas venintaj el virino. Tion ja neniu ion scianta povas sen honto nei. Ŝanĝu do de nun vian amon per servo al Dio kaj daŭra studado, kaj ne plaĉu al vi trakti nek servi surteran Sinjoron. Estu jam sufiĉe laborinta por aliaj, kaj vi laboru en viaj aferoj propraj: mi ne diras tamen mondanaj nek forpasantaj, sed spiritaj kaj daŭraj, kaj speciale klopodu komi kaj plibonigi vin mem. Rompu la ponton tra kie vi pasis, en maniero ke ne estu al vi eble reveni. Vi ne turniĝu malantaŭen, same kiel Orfeu, kaj ĉar en ŝtorma maro vi vivis, vi klopodu morti en sekura kaj trankvila haveno.

MARTÍ I, L'HUMÀ

(reĝis de 1396 ĝis 1410)

REGA PROPONO EN LA KORTEGA KUNVENO DE PERPINYA (26 JANUARO 1405)

Gloriosa dicta sunt de te. Ps. LXXX. VI.

Bonaj homoj:

Ni, volante sekvi la manieron antikvan kaj kutimitan de niaj antaŭuloj, kiuj en la komenco de siaj Kortegaj Kunvenoj kutimas diri kelkajn aferojn por edifado de siaj popoloj, decidis paroli pri la gloro de la princolando de Katalunujo. Kaj dum ni pensis pri tio, venis al ni en la penson iu diro de Izaio, kiu diras: *Clama. Quid clamabo? Omnis caro fenum et omnis gloria eius quasi flos agri, exsiccatum est fenum et cecidit flos. Isa. XL.* Nia Sinjoro diris al la profeto: Kriu. Diris la profeto: kion mi krios? Respondis Nia Sinjoro: krii ke ĉia karno estas fojno kaj ĉia gloro estas kvazaŭ floro de la kampo kie eltranĉata estis la fojno kaj falis la floro.

Kaj ni, vidante ke Nia Sinjoro Dio havas en tiel malmulta estimo la mondan gloron, ne sciiis pri kio paroli al vi; sed, ĉe tiu penso, venis en niajn manojn iu diro de iu Sankta doktoro, tre solena kaj aprobita de la Sankta Eklezio, kiun oni nomas Sankta Sedulí de Carmine pascali, kiu, en sia unua libro, donas al ni regulon kaj solvon en nia dubo, dirante: Kaj se la nekredintoj kun granda pompo faris librojn pri siaj fikcioj kaj mil falsajoj, laŭ diro de Ovidio en la *Metamorfoseos*; kaj se la gigantoj kaj la kentaŭroj kun krueleco igis ke oni metu al ili laŭdajn skribojn kaj triumfajn arkojn kaj kolonojn, por memorigo pri iliaj bataĵoj, laŭ diras Suetoni *Tranquilo*, libro primo duodecimo *Cesari-*bus; kaj se, pri aferoj ne veraj, ne decaj kaj ne eblaj, ili volis sonorigi la trumpon de la mensogo por laŭdo al la antikvuloj, kiel faras Homero in *Iliade*; kion devas fari ni, kiuj estas kristanoj kaj sekvas la veron, kiuj vidas tion nedubeblan kaj aŭdas la dian voĉon en ĉiu tago? Ĉu ni ne diros la favorojn kiujn Nia Sinjoro faris al ĉiuj, kaj ni ne diros la laŭdojn de tiuj kiuj ilin meritas, kaj ni ne diskonigos la meritojn de tiuj kiuj virte laboris? Kaj ĉu ne diras la *Eclesiastès*: *Laudemus viros gloriosos et parentes nostros in generatione sua etc. Eccles. XLIII.*; ni laŭdu la gloraĵojn virojn kaj niajn parencojn en ilia generacio?

Kaj al tio sama akordiĝas la ago, tre granda kaj rimarkinda, kiun la antikvaj romanoj plenumadis kuraĝigante kaj instigante la junajn virojn al virtaj faroj: kiam, en la grandaj kaj solenaj kunvenoj kiujn ili faris en Romo, la antikvuloj publikigadis la grandajn kaj solenajn armilajn farojn kaj virtajn agojn de la romanoj; en maniero ke la aŭdantaj junuloj forte varmiĝis, dezirante fari similajn agojn, kaj certe ili multajn efektivigis.

Nu, ni volas sekvi tiun kutimon ĉe vi, kiuj estas alta kaj tre pova parto de nia suvereneco, ne en maniero imitema, ne pruante-petante, ne per fabeloj, ne per pentrita laŭdo, *quia non sunt mihi loquellae neque sermones*, sed nur por manifesti la gloron de Nia Sinjoro Dio, kiun li montris ĉe vi. Kaj pro tio ke ni ne devas silenti pri la virto, la gloro kaj la nobleco de la princolando de Katalunujo kaj de la katalunoj, ni povas disvolvi la temon de ni komencitan: *Gloriosa dicta sunt de te*. Ps. ubi supra quod est thema.

Nobla Kortego kaj nobla princolando de Katalunujo, kaj vi katalunoj: Gloraj aferoj estas diritaj pri vi, per kiuj diroj elmontriĝas du konkludoj forte rimarkindaj. *Primo*, kiele la virto tre fama estas klare elmontrata: *quia gloriosa dicta sunt*. *Secundo*, de la tre kuraĝa gento tra la tuta mondo famkonata: *quia de te*.

Ni diras, unue, kiele la virto tre fama estas klare elmontrata: *quia gloriosa dicta sunt*, tio estas, gloraj aferoj estas diritaj. Kaj vi devas scii ke, laŭ Tullio (libro secundo, Retorice veteris) *Gloria est frequens de aliquo fama cum laude*, gloro estas daŭra pri iu persono famo kun laŭdo.

Ĉar Ni, ni trovas ke la katalunoj en tri aferoj forte rimarkindaj havis grandan famon tra la tuta mondo: *Primo*, ke kun granda lojaleco ili servis sian sinjoron. *Secundo*, ke kun granda harditeco ili laboris por sia kuraĝo. *Tercio*, ke per granda malavareco ili montris sian honoron.

Koncerne la unuan aferon, klaraj kaj facile rimarkeblaj estas al la mondo la granda afableco kaj servemo kiujn la katalunoj montris al sia natura sinjoro. Kaj tio pro la granda lojaleco kiu estis ĉe ili. Valerio, en la traktato de sia libro, diras tiajn vortojn: Ĉu necesas al ni serĉi dirojn nek agojn de fremdaj gentoj, se de la niaj propraj ni povas multajn trovi?

Tial ni lasos aparte ĉiujn aldirojn de Titus Livius, de Salustio, de Trogo Pompeo, de Eutropio, de Pau Orosio, de Juli Frontinus, de Suetonio, de Justo, de Lucanus, aŭ de Valerio, kvankam ili estis grandaj historiistoj, ĉar tiujn ni ne bezonas en la nuna okazo.

Nu, revenante al nia propono, ni vidu kiajn agojn faris la niaj. Ĉu ne estis granda la servo kiun faris Roger de Llúria al la sinjoro reĝo Petro, kiam li dispelis la ŝiparon de la reĝo de Francujo en la haveno de Roses? Ĉu ne estis granda la servo kiun

la Katalunoj faris al la reĝo Petro, ĉe la intermonto de Panissars, ĉar en tiu tago estis nur katalunoj? Ĉu ne estis granda la servo kiun la dirita Roger de Llúria faris al la sinjoro reĝo Jakobo, nia praaŭo, kiam li disfalis la povon de la reĝo Roberto de Napolo, en Sicilio, kaj kaptis la princon, lian filon, kune kun multaj al-tranguloj, kaj poste li kondukis tiun al Messina, kaj poste havis Sanktan Ludovikon kiel garantiulon, kaj laŭ reĝa ordono poste transloĝigis la diritajn kaptitojn al la montoj de Prades, en kastelo kiu havas nomon Siurana? Ĉu ne estis granda la servo kiun faris Bernat de Cabrera al la sinjoro Reĝo nia patro, kiam li disigis la ŝiparon de la ĝenovanoj en la haveno del Comte, kaj kiam konkeris Alguer, kaj poste, post dek-kvin tagoj, persone batalis kun la juĝisto de Arborea kaj venkis lin sur la kampo?

Pro manko de tempo ni ne rakontas la servojn kiujn Boxadó kaj aliaj katalunoj faris al la sinjoro Reĝo nia avo, en la milito de Sardenjo, nek ankaŭ ni zorgas detali la agojn glorajn kaj virtajn kiujn la princolando de Katalunujo kaj la katalunoj faris al la sinjoro Reĝo nia patro en la milito kontraŭ Kastilujo kaj aparte en la granda helpo kaj apogo kiujn ili donis al la regnoj de Aragono kaj de Valencio. Certe, do, ni povas atribui al vi tion, kion diris Sankta Johano: *Fuisti fidelis usque ad mortem et dabo tibi coronam glorie. Apocalipsi II.º*. Vi estis fidela ĝis la morto kaj tial meritas gloran kronon.

Due, ni diras ke kun granda harditeco ili laboris por sia kuraĝo. Ni ne volas kaŝi unu apartan favoron kiun Nia Sinjoro Dio faris al la katalunoj, ĉar ni povas diri ke, en ĉiuj armilaj faroj, kie katalunoj estas ĉeestintaj, ili montris sin en ĉiuj tempoj virtaj kaj kuraĝaj; sed necesas nur ke vi rigardu ĉiun lokon kie katalunoj estis pro iaj virtaj agoj kaj vi vidos kian renomon kaj famon ili lasis pri si mem.

Kaj, por mallongigi, ni volas diri de ili nur du agojn, ĉar se ĉiujn ni volus diri, antaŭe mankus al ni tago ol historioj rakontotaj.

Ĉu ne estis grava la servo kiun la katalunoj estas farintaj al la Eklezio de Dio kaj al la Sankta Patro en ilia liberigo? Ĉar, kiaj ajn estis la pasintaj traktoj, tamen fine katalunoj liberigis lin; el kio sekvis servo al Nia Sinjoro Dio kaj al ili famo kaj honoro.

Trie, ni diras ke sian malavarecon ili montris kun granda honoro. Kiu popolo estas en la mondo kiu tiel estas libera per rajtigoj kaj liberecoj, nek tiel liberema kiel vi? Ĉar ni trovas ke ĉiuj popoloj de la mondo, aŭ la plej granda parto, estas subjugataj al la taksajoj de siaj sinjoroj kaj al la donoj de ilia bonplaĉo, esceptitaj vi kiuj estas liberaj de tiuj taksajoj; sed via malavareco estas tia, ke ni povas diri ke neniam niaj antaŭuloj havis bezonojn, kiujn vi ne helpis kaj rimarkinde forigis.

Kaj por pruvi tion nur estas necese konsideri la grandan hel-

pon kaj apogon kiujn vi faris al la sankta reĝo En Jaume, al kiu por konkeri la regnon de Mallorca vi donis la kvinonon de ĉiuj viaj havaĵoj: Kiom granda estis la helpo kiun la katalunoj faris al la reĝo En Pere nia kvara avo, en la milito kontraŭ la francoj, kaj, kvazaŭ ne sufiĉus ke ili por li metis siajn korpojn en danĝeron, ili ankoraŭ metis ĉiujn siajn havaĵojn en lian posedon, por prunti monon kaj subteni la diritan militon! Kaj ni ne devas iri malproksimen, sed nur vidi la grandan kaj rimarkindan helpon kiun vi faris al la sinjoro reĝo nia patro, en ĉiuj liaj bezonoj, kaj aparte en la fakto de la Unuiĝo kaj en la milito kontraŭ Kastilujo, ĉar nur en unu Kunveno, kiun li havis kun la katalunoj en Tortosa, ili donis al li, por subteni la diritan militon kontraŭ Kastilujo, XVII *kontojn* da mono. Bone povas esti dirate pri via malavareco kaj helpemo: *Compleverunt honorem Domini in donis suis. Eccli. L.* Ili plenumis la honoron de sia sinjoro en siaj donoj.

Nu, konsiderante la grandan lojalecon per kiu vi servis vian sinjoron, vian harditecon laborantan por via kuraĝo, kaj tiel same vian malavarecon montrantan vian grandan honoron, oni vidas klare pruvita la unuan parton de nia divido, en kiu ni diris: kiele la virto tre fama estas klare elmontrata; *quia gloriosa dicta sunt.*

Ni diris due en la vortoj de ni komencitaj: de la tre kuraĝa gento tra la tuta mondo famkonata: *quia de te*, tio estas, de vi.

Ne komprenu vi, princolando de Katalunujo, ke la laŭdojn, kiujn ni diris, ni diras pri fremda gento aŭ pri gento solde tenata aŭ pri gento ankoraŭ venonta; male, tutan tiun gloron kaj bonon ni diras *de te*, tio estas, pri vi, laŭ la gramatikistoj vorto kiu montras pri afero estanta.

Kaj, pro viaj meritoj, viaj honoro kaj gloro estas tra la tuta mondo eterne disvastigataj; el kio ŝajnas, ke tio estas la beno kiun Dio donis al Abraham dirante: *Terra in qua dormis tibi dabo et occidentem et septentrionem et meridiem. Genesi XXVIII.* Kaj restas pruvita la dua parto de nia divido, en kiu ni diris: de la tre kuraĝa gento tra la tuta mondo famkonata: *Quia de te.*

Kaj, por fini nian parolon, ni volas diri al vi agon, tre virtan, kiun la sinjoro Reĝo, nia praavo, faris kiam li sendis la sinjoron Reĝon nian avon al la konkero de Sardenjo: li, tenante la flagon nian reĝan en la manoj, diris tiujn vortojn: Filo, mi donas al vi la flagon nian antikvan de la princolando de Katalunujo, kiu havas apartan privilegion kiun estas necese ke vi bone gardu; kiu privilegio ne estas io falsa aŭ nepruvita, male ĝi estas pura kaj hela kaj sen ia makulo kaj sigelita per orkoloro; kaj ĝi estas tiu, ke, neniam, en kampo kie nia reĝa flago estis, ĝi estis venkata nek forpelata. Kaj tio pro aparta favoro de Nia Sinjoro Dio kaj pro la granda fideleco kaj lojaleco de niaj regatoj.

Kaj tial ni povas turni al vi tion, kion diris Julio Cezaro, venante el la konkero de Germanujo, al siaj soldatoj: Levu, levu

vian flagojn, ĉar indaj vi estas havi la sinjorecon de Romo. Tiel diras Luca en sia unua libro pri la bataloj. Nu, bone ni povas diri al vi: Levu, levu viajn flagojn, ĉar indaj vi estas posedi la princolandon de Katalunujo. Kaj tie-ĉi estas disvolvita la temo, de ni komencita, en kiu ni diris: *Gloriosa dicta sunt de te.* Tio estas: gloraj aferoj estas diritaj pri vi.

Konsiderante ke de antaŭ longe en la princolando de Katalunujo ne estis propraj Kortegaj Kunvenoj, nek ili povis provizi je la bezonoj de la dirita princolando, ni kunvokis la nunan Kunvenon por ke, se maljustaĵoj aŭ ofendoj estas faritaj, tiel de la sinjoro Reĝo nia patro kaj de la sinjoro Reĝo nia frato, de glora memoro, kiel de ni mem aŭ de niaj oficialaj servantoj, ni povu tiujn korekti kaj fari la konvenan justecon; kaj ni petas de vi ke, same kiel vian grandan malavarecon vi montris al niaj antaŭuloj, tiel al ni ĝi estu de vi bonvoleme montrata. Kaj plaĉu al Nia Sinjoro Dio doni al ni tiom da gvido, ke ni povu regi vin en tia formo ke ĝi estu servo kaj gloro lia kaj bono por vi, tiamaniere ke tie-ĉi ni meritu lian gracon kaj per ĝi lian gloron.

Amen.

JORDI DE SANT JORDI

(unua duono de la XV^a jarcento)

Oni ne scias la ĝustan daton de la naskiĝo de Jordi de Sant Jordi, Valencian kavaliro, nek ankaŭ tiun de lia morto. Li estis servanto kaj intimo de la reĝo Alfons IV el Magnanim kaj partoprenis kiel militisto kelkajn batalojn en Italujo, en unu el kiuj li restis kaptito de Sforza, generalo de la Sicilia reĝo. Dum sia kaptiteco li verkis unu el siaj plej belaj poemoj, kies tradukon ni prezentas. Li ĉefe verkis pri molaj amaj sentoj, kun tre flua stilo. Li estis granda admiranto de la itala Petrarca, kies aman poezion li iel imitis. Siavice li estis admirata de la alta kataluna poeto Auziàs March, kamarado lia. Pri li diris la hispana poeto Markizo de Santillana, ke li verkis *asaz hermosas cosas*... La konservitaj poemoj de Jordi de Sant Jordi estas dek ok, kiujn eldonis kun kritika studo Jaume Massó Torrents, en 1902.

DESERT D'AMICS, DE BENS E DE SENYOR...

Sen amikar', sen havo, sen sinjor',
en fremda lok', en lando nekonata,
sen ia bon', kun tedo kaj dolor',
kun mia vol' kaj penso katenata;
mi vivas nun en plena malliber',
amika zorg' al mi ĉi-tie mankas;
ja kaptis min kaj gardas liga fer',
pri kio mi al mia sort' nur dankas.

Dum longa temp' neni' plaĉis al mi,
mi ŝatas nun eĉ krudan malgajaĵon,
kaj eĉ mi nun ĉenerojn ŝatas pli
ol antaŭ temp' la belan vestbrodaĵon;
montris al mi sian povon la sort'
pelante min al la ĉagrenoj nunaj,
sed en trankvil' mi restas kaj honor'
ĉar luktis mi kun la bravuloj kunaj.

Konsolas min ke venis kaptitec'
nur pro fidel', serv' al mia sinjoro,
kun armilar', sub pli granda fortec',
sed ne pro mank' je kavaler-honoro.
Kaj pensas mi ke ne konkeras hom'
famon, se li labor-pezon ne sentas,
sed kun malĝoj' mi vidas ke la mond'
alie nur pri la ŝajnoj kontentas.

Ĉia malbon' estas eta sufer'
antaŭ malĝoj' kiu koron disŝiras
kaj kiu min disigas el esper':
kiam sen ĉes' ni pri io sopiras
proksimigonta nin al la liber';
dum vidas mi kion Sforza postulas,
kiu rezonojn aŭdas kun koler',
pro kio mi en mia koro brulas.

Nenion mi en la nuna moment'
ekvidas ja, kio nin helpi povas,
krom nia Di', de ĉio fundament',
en kiu ni plej grandan helpon trovas,
kaj krom la Reĝ' kiu montradis sin
kun am' al ni kaj bonkoreco pia;
el la malbon' li certe tiros nin
ĉar estas ni sub la regado lia.

Ho mia Reĝ' kaj natura sinjor',
ni turnas nin al vi nur kun la preĝo
ke via am', protekto kaj favor'
atingu nin, fidelajn al la reĝo.

AUZIÀS MARCH

(1393-1459)

En la jaro 1393 naskiĝis en Gandia Auziàs March. Plej aĝa filo el branĉo, transplantita en Valencion okaze de la konkero, de antikva familio kataluna, li estis edukata dum sia juneco en la devoj kavalirecaj, en la amo al la literaturo kaj en la studado de la filozofio.

Li estis nevo de Jaume March, tiu, kiu kune kun Lluís d'Àverçó starigis en Barcelona la "Akademion pri la Bela Scio", kaj kiu tiel sukcese kulturadis la poezion, ĉefe en la formo de "rimitaj novaĵoj". Li estis filo de Pere March, sin doninta ankaŭ al la rakontarto kaj distingiginta en la moralaj "serventezoj". Li estis kuzo de Arnau March, kaj li farigis militkamarado en Sardenya kaj Ĉorsega (1420) de Jordi de Sant Jordi, granda konanto de Petrarca, kaj de Andreu Febrer, kiu, ok jarojn poste, estis finonta sian tradukon de Dante.

Tro serĉis la kritikistoj la paralelismojn de Auziàs March kaj Petrarca. Ĉe ili nenio fundamenta estas komuna, krom tio kion unu kaj alia heredis de la trobadoroj. En tiu grado, en kiu pri granda poeto ni povas diri ke li apartenas al iu skolo, Petrarca kaj Auziàs March apartenas al la provençala.

Auziàs March, dufoje edziĝinta kaj tre ofte sklavo de la "freneza amo", kantas per filozofiaj terminoj kaj ĉe la persono de "Na Teresa", la amon homan, ne korpan, sed ankaŭ ne platonikan. Liaj poemoj estas tre malproksimaj de la erotikeco de la antikvaj trobadoroj, tiom, kiom lia "Teresa" diferencigas de la virino-angelo de la italoj.

Ĉiam, kiam la ideoj de Auziàs March estas konkretigitaj en bildoj, ili enhavas la forton de pentraĵo danteca. Sed ĝenerale li movas sin en la kampo de la abstrakto, kaj tio faras lin malglata al la moderna leganto, kiu ne konatiĝis funde kun la skolastiko. Se li estus pli uzinta la plastikan fantazion, ni trafe dirus ke la verko de Auziàs March estas al la psikologio, kio al la teologio estas la *Commedia* de Alighieri.

Auziàs March, plene eliĝante el la provençalaj formoj kiuj ankoraŭ pezadis sur liaj samtempuloj, estas la ĉefo de la lasta skolo de nia klasika poezio, jam nete kataluna; de tiu skolo, kiu havas por lasta reprezentanto unu el la pranepoj de nia granda poeto ankaŭ nomita Auziàs March, vivinta en Cervera komence de la XVII^a jarcento.

Mortis la Poeto en 1459, sed ne necesis la morto por pligrandigi la famon de lia nomo, pri kiu estas atestanto, jam dum lia vivo, la Markizo de Santillana.

Kiu volas eniri en la fundon de la biografio kaj de la verko de la poeto, tiu legu la verkon: *A. Pagès, Auziàs March et ses prédécesseurs*, kaj la recenzon pri ĝi faritan de la revuo *Romania* (vol. 41, 1912). Por la estetika valorigo de la poeto: *A. Rubió i Lluch, Comentaris sobre una crítica d'Auziàs March* (Anuari de l'Institut d'Estudis Catalans 1911-12).

Katalune verkis

LLUIS NICOLAU D'OLWER

El "Poesies d'Auziàs March" elektitaj de Joan Estelrich, eltititaj el la kritika eldono de Amadeu Pagès.

Kolekto "Minerva", Barcelono, 1918.

FANTASiant, AMOR A MI DESCOBRE...

(unuaj strofoj)

En mia pens', la Am' al mi malkovras
pri la sekret' al ĉiuj plenkasaata,
kaj mia tag' por homoj estas nokto
kaj nutras min kion ili ne mangas.
Tiel en Am' mia spirito vivas
ke tute ĝi de l' korp' foriĝi ŝajnas;
mia dezir' ne trovas sin en homo
krom en la hom' kiun ne regas karno.

Ne sentas karn' en mi l' ardan deziron
kaj la spirit' pri amaj agoj revas.
De l' blinda fajr' varmigo de l' amantoj
ne estas tim' ke mi la ardon sentus.
Alia vol' ja mia volo estas,
kiam ĝi Vin amante kontentiĝas:
ne havas ĝin pasiaj geamantoj
pro troa varm' antaŭ la Am' ne indaj.

Se estus Am' io scia kaj saĝa
kaj havus ĝi superregantan sceptron
— premi' kaj pun' de bonoj kaj malbonoj —,
mi estus ja fenikso ĉe l' plej bonaj,
ĉar sola mi forlasis la miksaĵon
de malbec' kaj beldeziroj kunaĵ.
Ne decas pun' al mi, je tentoj pura:
ilia kulp' en mi ja estas nula.

Kiel la lum' de l' mond' estis fiktiva
 antaŭ la lum', por la Sanktuloj, Dia,
 kaj en malŝat' de l' vana monda gloro
 al pleja glor' posta ili aspiris:
 tiel por mi ja estas malŝatinda
 tiu dezir' post kiu Am' mortigas,
 kaj amas mi dezirojn de l' spirito,
 sen ia lac', kun daŭra multobliĝo.

JOHANOT MARTORELL

(1460)

La 2an de Januaro de 1460 Johanot Martorell, kavaliro naskiĝinta en Valencio, komencis skribi la verkon "Tirant lo Blanch", kiun li pro sia morto ne povis fini. Martí Joan de Galba daŭrigis ĝin, verkante la kvaran parton de la libro. Ĝi estis unuafoje presata en Valencio dum la jaro 1490 kaj atingis grandan sukceson. Ĝi estis do la unua "libro de kavaliraĵoj" presata en la Iberia duoninsulo. En 1497 oni reprenis la "Tirant" en Barcelona; en 1501 ĝi estis tradukata en la italan lingvon de Niccolò da Correggio; en 1511 aperis alia traduko en hispana lingvo, farita de anonimulo en Valladolid; en 1538 ĝi estis denove tradukata en la italan lingvon de Lelio di Manfredi, Venezia; pli poste ankaŭ tradukis ĝin francan la grafo de Caylus.

Pri la valoro de "Tirant lo Blanch", tiel pri ĝia belega stilo kiel pri la riĉa fantazio de ĝiaj aŭtoroj, povas doni ideon la fervoraj laŭdoj kiujn ĝi meritis de Cervantes, la aŭtoro de la fama "Don Kihoto". En la sesa ĉapitro de tiu ĉefverko de la hispana lingvo, en la sceno kie la Pastro forbruligas la librojn frenezigitajn Don Kihoton (el kiu forbruliĝo nur kelkaj libroj, inter ili la "Tirant", estas savataj), Cervantes skribas:

"—¡Válame Dios, dijo el Cura, dando una gran voz, que aquí esté *Tirante el Blanco!* Dádmelo acá, compadre, que hago cuenta que he hallado en él un tesoro de contento y una mina de pasatiempos. Aquí está Don Quirieleysón de Montalbán, valeroso caballero, y su hermano Tomás de Montalbán y el caballero Fonseca, con la batalla que el valiente de Tirante hizo con el alano y las agudezas de la doncella Placerdemivida con los amores y embustes de la viuda Reposada, y la señora Emperatriz enamorada de Hipólito, su escudero. Dígoos en verdad, señor compadre, que, por su estilo, es el mejor libro del mundo: aquí comen los caballeros y duermen y mueren en sus camas, y hacen testamento antes de su muerte, con otras cosas de que todos los demás libros de este género carecen... Llevadle a casa y leedle, y veréis que es verdad cuanto dél os he dicho."

Se Cervantes diris, pri tiu fama kataluna verko, ke "pro sia stilo, ĝi estas la plej bona libro en la mondo", ĉiuj pliaj laŭdoj estas superfluaĵ.

La libro "Tirant lo Blanch" estis influata de aliaj katalunaj verkoj, precipe de "La Songó" de Bernat Metge, kaj siavice influis la verkon "Don Kihoto" mem. (Vidu: *El "Tirant lo Blanch"* i "*Don Quijote de la Mancha*", de J. Givansl Mas, "Quaderns d'Estudi", 1922).

Lastaj eldonoj de "Tirant lo Blanch": Eldono Marian Aguiló, 4 volumoj, Barcelona, 1873; eldono Archer M. Huntington, New-York, 1904; eldono Joan Givanel, 2 volumoj, Sant Feliu de Guixols, 1920; eldono J. M. Capdevila, kolekto "Els Nostres Clàsics", Barcelona, 1924.

DU FRAGMENTOJ DE "TIRANT LO BLANCH"

KIAMANIERE TIRANT ESPRIMIS AL LA PRINCINO SIAN AMON

Matene, kiam la Imperiestro estis ĉe la diservo kun ĉiuj sinjorinoj, Tirant eniris en la preĝejon kaj faris sian preĝon; poste li eniris en la ĉambron de la Imperiestro kaj diris al li:

—Sinjoro, la galeroj estas en ordo por forvojaĝi kaj marveturi al Xipre por porti provizojn, se volas la majesteco via ke ili foriru.

La Imperiestro diris: —Mi volus ke ili estu jam cent mejlojn en maron.

Kaj Tirant rapidis al la haveno por foririgi ilin.

Kiam la Princino vidis ke Tirant foriras, ŝi vokis Diafebus kaj multe petis lin diri al Tirant ŝianome ke li venu tuj post la tagmango, ĉar ŝi havas grandan deziron paroli kun li, kaj ke poste ili dancos. Kiam Tirant sciis tion, rapide li pensis kio ĝi estas, kaj mendis aĉeti la plej belan spegulon troveblan kaj ĝin metis en la manikon. Kiam al li ŝajnis la tempo, ili iris al la palaco, kaj ili trovis la Imperiestron interparolanta kun sia filino. Kiam la Imperiestro ilin vidis veni, li ordonis venigi la muzikistojn, kaj oni dancis antaŭ li longtempe; kaj la Imperiestro, iom rigardinte, retiriĝis en sian ĉambron. Kaj la Princino lasis tuj la dancadon, prenis Tirant per la mano, kaj ili sidiĝis apud fenestro; kaj la Princino donis komencon al tia parolo:

—Virta kavaliro, multan kompaton mi sentas al vi pro la malbono kiun mi vidas vin travivi; tial mi petas vin bonvolu manifesti la malbonon aŭ bonon kiun via virta persono sentas, ĉar tia malbono ĝi povos esti, ke mi pro amo al vi partoprenos ĝin, kaj mi estos tre konsolata fari al vi bonon. Tiel, faru al mi la plezuron tuj diri tion.

—Sinjorino, diris Tirant, mi malamas la malbonon kiam ĝi venas en tempo de bono, kaj multe pli kiam pro ĝi perdiĝas la bono; kaj pri tia malbono mi ne sciigus Vian Altecon, ĉar mi pli volus

ĝin tutan por mi, ol igi iun preni en ĝi parton. Pri similaj paroloj ne plu decas paroli (1); ni parolu, sinjorino, pri aliaj aferoj de plezuro kaj gajo, kaj lasu tiujn de pasio, kiuj turmentas la animon.

—Certe ne estas iu afero, diris la Princino, kiel ajn kara ĝi estus al mi, kiun al vi mi rifuzus diri, se vi volus ĝin scii, kaj male vi ne volas paroli al mi pri viaj. Mi denove vin petas, pro tio kion vi plej amas en la mondo, diri ilin al mi.

—Sinjorino, diris Tirant, la gracon mi petas bonvolu ne tiel forte devigi min; ĉar tiom, sinjorino, vi montris antaŭ mi ke ĉiom kion mi scias en tiu-ĉi mondo mi diros al vi. Sinjorino, mia malbono baldaŭ estos dirita, sed mi estas certa ke ĝi baldaŭ estos ĉe la oreloj de via patro, kaj tio estos kaŭzo de mia morto; kaj se mi ne diras ĝin, ankaŭ de malĝojo kaj ĉagreno mi devos morti.

—Kaj ĉu vi pensas, Tirant, diris la Princino, ke la aferojn meritajn esti tenataj sekretaj mi volus diri al la sinjoro mia patro nek al iu alia persono? Ne pensu ke mi iradas vestita de tiu koloro kiun vi pensas. Ne havu timon diri al mi tutan vian aferon, ĉar mi tenos ĝin fermita en mia sekreta interno.

—Sinjorino, ĉar via alteco devigas min diri tion, mi povas diri nur ke mi amas.

Kaj li ne diris plu, sed mallevis la okulojn al la jupo de la Princino.

—Diru al mi, Tirant, diris la Princino, ĉu Dio lasas al vi atingi kion vi deziras; diru al mi kiu estas la sinjorino kiu tiom da malbono kaŭzas al vi; ĉar se en io mi povos helpi vin, mi tion faros tre volonte; ĉar mi deziregas scii tion.

Tirant metis la manon en la manikon, elteris la spegulon, kaj diris:

—Sinjorino, la bildo kiun vi vidas tie, povas doni al mi morton aŭ vivon; via alteco ordonu al ĝi favori min.

La Princino rapide prenis la spegulon kaj per viglaj paŝoj eniris en la ĉambron pensante ke ŝi trovos tie ian virinan portreton, kaj ŝi vidis tie nenion krom sia vizaĝo. Tiam ŝi havis plenan ekkonon ke pro ŝi fariĝas la festo, kaj ŝi restis tre mirigita ke sen parolo povas homo esprimi al virino sian amon.

ARMKORSETO DE TIRANT

Kiam la Princino vidis Tirant, ŝi vokis lin kaj diris:—Kaptano, laŭ mi vidas, via foriro estas certa; mi preĝas al la Sinjoro de ĉio ke li donu al vi venkon kun honoro... Tirant, vidu antaŭ via foriro ĉu ion vi volas de mi; diru tion, ĉar mi certigas al vi ke ĝi estos al vi donata kun la deziro neniam rifuzi ion al vi. Se

(1) Oni rimarku la vortripetojn.

vi bezonas oron aŭ arĝenton aŭ juvelojn, mi volonte donos ilin al vi sen rimarko de mia sinjoro patro pri tio.

—Sinjorino, diris Tirant, mi kiel obeema servanto de la alteco via esprimas al vi senfinan dankon, sed mi petegas ke vi faru al mi apartan favoron.

—Se al mi estos deca afero, diris la Princino, mi estos kontenta fari tion; sed unue mi volas scii kion vi volas havi de mi, ĉar mi konsistas el tia metalo, ke neniam mi promesis ion kion poste mi ne plenumis, ĉu ĝi estis bona aŭ malbona; mia parolo ne povas reiri malantaŭen; tion povas certigi al vi ĉiuj miaj servantinoj kaj ĉiuj kiuj konas min, ĉar mia jes estas jes kaj mia ne estas ne.

—Tiom pli granda estas via virto, diris Tirant; kaj mi, sinjorino, petas nur ke la alteco via bonvolu doni al mi tiun ĉemizon kiun vi surportas, ĉar ĝi estas tiel proksima al via kara korpo, kaj ke per miaj manoj mi povu elpreni ĝin.

—Sankta Mario helpu, diris la Princino, kio estas kion vi diras al mi? Mi estos tre kontenta doni al vi la ĉemizon, juvelojn kaj robojn, kaj ĉion kion mi havas, sed al mi ŝajnas ke ne estus justa afero ke viaj manoj tuŝu tien, kien neniu estas tuŝinta.

Kaj rapide ŝi eniris en sian ĉambron, kaj demetis la ĉemizon, kaj surmetis alian; kaj ŝi eliris al la granda salono, kie ŝi renkontis Tirant, kiu ŝercadis kun la servantinoj, kaj ŝi vokis lin aparte, kaj al li donis la ĉemizon, kaj ĝin ŝi kisis antaŭ li multfoje por ke li pli kontentiĝu. Tirant prenis ĝin kun granda ĝojo, turnis sin al la gastejo, kaj diris al la servantinoj: —Se la Imperiestro vokas min, diru al li ke baldaŭ mi revenos, ke mi iris armi min, por ke mi povu baldaŭ foriri.

Kiam Tirant estis en sia gastejo, li finis armi sin. Kaj li renkontis tie Diafebus kaj Ricard, kiuj estis revenintaj por surmeti siajn armkorsetojn.

Kiam Tirant estis tute armita, li survestis sin per la ĉemizo de la Princino, faldis la dekstran manikon ĝis apud la ŝultro, kaj la maldekstran ĝis la kubuto, ligis ilin per ora ŝnureto, kaj li igis ke oni surmetu sur lin bildon de Sankta Kristoforo kun Jezuo en la maldekstra flanko, ĉio el oro, bone alligita por ke ĝi ne falu. Kaj tiel venis la tri kavaliroj ricevi adiaŭon de la Imperiestro kaj de ĉiuj sinjorinoj. Kiam ili estis supre, ili renkontis la Imperiestron, kiu estis atendanta sian kapitanon, ĉar li volis ke li tagmanĝu kun li. Kiam la Imperiestro ekvidis Tirant, li diris:

—Nia kapitano, kia armkorseto estas tiu kiun vi survestis?

—Sinjoro, diris Tirant, se la majesteco via sciis la econ kiun ĝi havas, vi restus tre mirigita.

—Multe plaĉus al mi scii tion, diris la Imperiestro.

—La virto kiun ĝi havas, diris Tirant, estas fari bonon, ĉar

kiam mi foriris de mia lando ĝin donis al mi knabino, kiu estas la plej bela kaj de ĉiaj virtoj plena el ĉiuj knabinoj estantaj en la mondo. Mi ne diras tion en malpliigo de la sinjorino Princino, kiu tie-ĉi estas, nek de la aliaj knabinoj, kiuj honoron meritas.

Diris la Imperiestro: —Certe neniam oni faris en la mondo bonan armilan faron, se oni ne faris ĝin pro amo.

—Kaj pro tio, sinjoro, diris Tirant, mi promesas al vi, je fido de kavaliro, ke en la unua batalo kie mi ĉeestos mi vidigos mian armkorseton de amikoj kaj de malamikoj.

JOAN ROÏÇ DE CORELLA

(1430-1500)

Valencia kavaliro, majstro en sakra Teologio kaj eleganta parolanto kaj retorikisto, Joan Roïç de Corella verkis tradukojn el la latina lingvo, originalan prozon kaj delikatajn poemojn. Liaj prozaj verkoj estas historiaj kaj literaturaj; liaj poemoj estas diversaj, precipe amaj kaj religiaj. Li estis tre fama en sia epoko, ĉefe pro la religia poemo "Oració". Oni komparis lin al la hispana Garcilaso.

Moderne estas publikigita la "Plena verkaro de J. Roïç de Corella", de R. Miquel i Planas, en Barcelona.

KANZONO

Por mia vund', sola balzam'
estas la blu'
de l' rigard' via, se ĝi jam
ne volas plu
ke mortu mi pro via am'.

Klarigos sin post mia mort'
mia pasi',
kaj ja ne aŭdos vi sen plor'
ke mortis mi
ĉar min ne amis via kor'.

Por mia vund' estus balzam'
nur la influ'
de dolĉ-rigard' diranta jam
ne voli plu
ke mortu mi pro via am'.

POPOLKANTOJ